Emanuel Geibel,

# Migrado

*tradukita de Ludwig Emil Meier*

1. Nun Majo alvenis,
Burĝonas la arbar',
Do restu en hejmo,
Filistra homar'!
La nuboj ĉe ĉielo
Migradas jam for,
Laŭ ili nun fortiras
Min la migrama kor'.

2. Nu, patro, patrino,
Adiaŭ nun al vi,
Feliĉon ekstere
Serĉadas nun mi,
Ja, multe da vojoj
Ne vidis mi jam
Kaj multe da bonvino
Nur konas mi laŭ fam'.

3. Antaŭen, antaŭen
Dum hela sunradi',
Trans montoj, trans valoj
Kun vigla energi'!
La fontoj murmuras,
Bruigas arbojn vent',
La koro kun alaŭdo
Kunkantas pro kontent'.

4. Vespere en urbeto
Gastigos min trinkej':
"Ho, mastro, nur vinon,
Sed de bongusta plej!"
"Ekprenu gitaron,
Gajega muzikant'!"
"Prikantos mi knabinon,
De kiu mi amant'."

. . .

5. Se mankos restejo
Kun noktripoz' kaj vin',
Sub ĉielo mi kuŝos,[3]
La steloj gardos min,
Bruanta tilio
Lulados al dormad',
La matenruĝo vekos[4]
Denove al migrad'!

6. Migrado, migrado
Libera ĝojo vi,
En brust' freŝe blovas
La spiro de Di',
La koro ĝojegas
Por la ĉirkaŭa rond',
Ke vi do estas bela,
Ho, vasta, vasta mond'!

*Traduko de la Germana poemo "Der Mai ist gekommen" de Emanuel Geibel en Esperanton de* Ludwig Emil Meier *(∗1847-02-16 – †1919).*

*Arg-235-466 (2006-05-07 20:51:04)*

*Tiun ĉi tradukon mi, Manfred Retzlaff, prenis el la libro "Esperantista Kantaro", Kolekto unua: Germanaj kantoj popolaj kaj studentaj, Esperantigitaj de L. E. Meier, eldonita en 1907 de Hans Theodor Hoffmann, Berlin W. 35, Steglitzer Str. 44.*

[3] Rimarkigo de Manfred Retzlaff: En la "Esperantista Kantaro", el kiu mi la tekston detajpis. la linio tekstis: Sub ĉielo min kuŝos. Sed tio verŝajne estas pres-eraro.
[4] Ŝanĝpropono de Manfred Retzlaff: La matenruĝ' min vekos